


# Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1969 5

# KULTURAJ KAJEROJ

1969 SEPTEMBRO-OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

**Pri Grésillon**

**Esperanto tra la Mondo** — A. Frangeul

**La Provenca Literaturo**
Roumanille, Mistral, Aubanel — H. Bourdelon

**Tra Francujo**
Vojaĝo en Quercy

**François Rabelais**
kaj Renesanco (II) — E. Motillon

**Poeziaĵoj** — A. Logvin, Gyula B. Bérczessi

**Nostradamus** — Dro P. Ganière (trad. S.G.)

**Detektiva Aventuro**
Anonima letero — P. Cheney (trad. S.G.)

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# Pri Grésillon

Denove la silento instaliĝis en Gresillon. La reĝado de la aĵoj anstataŭis la reĝadon de la homoj. La foteloj, tabloj, kiuj dum pli ol du monatoj estis uzeblaĵoj fariĝis kastelanoj ; kiam seĝo ĝenis oni ĝin flankenpuŝis ; nun oni ĝin ĉirkaŭiras. Ĉu la mebloj memoras la tagojn, kiam la homoj ilin ignoris aŭ senpripense uzis ? Eble ne. Sed la homoj certe memoras tiujn tagojn.

Ĉi jare vizitis Gresillon pli ol kvarcent kvindek gesamideanoj el dekkvin landoj. En julio la diversaj kursoj kaj prelegoj multe plaĉis al la partoprenantoj bedaŭrinde tro malmultaj. Dum la unua periodo la kursoj de S-ino Vincent kaj S-ro Ribot estis atente ĉeestitaj. La Kultura Semajno de U.F.E. kun malmulte da gejunuloj tamen plezurigis ĉiujn dank'al la gvidado de S-roj Boyet kaj et Thierry. Poste la Internaciaj Turismaj Ferioj grupigis tre interesatan ĉeestantaron ĉirkaŭ S-ro Major, S-ino Cheverry, S-ro Metivier, kiuj prezentis tre diversajn kaj allogajn temojn. Ankaŭ la ekskursoj interesis ĉiujn.

La plej grandan sukceson atingis la Kulturaj Esperantistaj Semajnoj dum aŭgusto, kun 120-130 partoprenantoj. Ankaŭ kuraĝiga estis tiu periodo pro la nombro da gejunuloj : 60, el kiuj 37 estis inter 16 kaj 25 jaraĝaj. Ĉiuj diligente sekvis la kursojn sub la gvido de S-roj Le Magadure, Babin kaj Thierry kaj la rezultoj de la ekzamenoj montras, ke la loboro estis fruktodona. La pli multo el la restadantoj partoprenis la flankajn aktivaĵojn. La tute nova « Inicado al teatro-arto » gvidita de S-ro Thierry estis plensukcesa. Grupo da gejunuloj kaj mezaĝuloj prezentis tre agrablan kaj valoran programon, kiu ricevis tre merititajn aplaŭdojn. Tiu provo montris, ke ni devas daŭrigi, eĉ pliampleksigi tiun aktivaĵon. Ankaŭ citindaj estas la popolaj dancoj gvidataj de S-ino Ligot, la kabareta vespero kun partopreno de S-roj Thierry, Gaudry kaj Friedlander, la mimprezentado sur la prilumita insuleto fare de grupo de infanoj sub la gvido de S-ro Tessier kaj la teknika kompetenteco de S-roj Peray kaj Doury. Kompreneble la kutimaj aktivaĵoj : bindarto kaj korbofarado plej kontentige funkciis dank'al la konsiloj de la gvidantinoj Françoise Lenel kaj Juanita Turbillon.

La kvina periodo ne kunigis tiom da geamikoj, kiom ni deziris pro tio, ke la lerneja jaro komenciĝis tre frue. Sed la etoso estis simpatia, kaj la kursoj de S-roj Ribot kaj Friedlander ĉeestataj ne nur de la restadantoj sed ankaŭ de grupo de Baugé-anoj.

Ni devas danki ĉiujn, kiuj per sia laboro aŭ aktiva partopreno sukcesigis tiun someron.

# Esperanto tra la Mondo ★

## Kongresoj.

— HELSINKI : 1.850 partoprenantoj, venintaj el 39 landoj, ĉeestis la 54-an Universalan Kongreson de U.E.A. de la 26-a de Julio ĝis la 2-a de aŭgusto. La ĉefaj programeroj estis : solena inaŭguro, festparolado de la prezidanto D-ro Lapenna, laboraj kunvenoj, agrablaj vesperoj, somera universitato, literatura kaj oratora konkursoj, fakaj renkontoj, ekskursoj, debatoj. Eminentuloj ĉeestis la inaŭguron : finna ministro pri planado, vicurbestro, diplomatoj. Finnaj gazetaro, radio kaj televido raportis pri la kongreso kaj Radio-Helsinki ĉiutage dissendis novaĵojn en esperanto.

La konkludo de la festparolado de D-ro Lapenna estis : « La homo sukcesis meti sian piedon sur la dezertan surfacon de la luno... Devas veni la tempo, kiam tiu sama homo povos viziti apudan landon kaj kompreni sian najbaron, kiam la mastro de la mondo ĉesos esti surda kaj muta en fremdaj lingvaj medioj ».

En 1970 la Universala Kongreso okazos en Vieno inter la 1-a kaj la 8-a de aŭgusto. La junulara kongreso de TEJO okazos en Graz (8-15-an de aŭgusto).

— NOVI-SAD : la Internacia Kongreso de SAT kunvenigis 250 esperantistojn el 15 landoj en Novi-Sad (Jugoslavio) de la 3-a ĝis la 8-a de aŭgusto. El la diversaj interesaj programeroj laboraj kaj distraj ni citos la prelegojn de S-roj Aaarse, Finkenzelles kaj Tibor Sekelj. En 1970 la kongreso de SAT okazos en Augsburg (Germanio), de la 25a ĝis la 30-a de julio. Informoj ĉe SAT, 67, avenue Gambetta, Paris-20e.

— AVIGNON : 523 gefervojistoj el 18 landoj kongresis en tiu urbo de la 17-a ĝis la 23-a de majo. Terminara, junulara kaj statutmofida komisionoj kunvenis. Oni akceptis nove fonditan sekcion de Rumanio. En 1970 IFEF kongresos en Rimini (Italio).

## Por la gejunuloj.

— La gejunuloj povos ĉeesti, en favoraj kondiĉoj, la 13-an Internacian Seminarion de Germana Esperanto-Junularo, kiu okazos inter la 27-a de decembro 1969 kaj la 3-a de januaro 1970 en la junulargastejo de Marburg, Norda Heslando. Krom la distra parto, la ĉefa temo de la renkonto estos « Tendencoj en la literaturo de nia epoko ». Vi povas aliĝi, se vi estas inter 16 kaj 35-jara, skribante al : S-ro U.J. Moritz, Andreastr. 57, 5161 Merken, Germanio.

— Konvenas denove atentigi la esperanto-societojn pri la kampanjo de Skolta Esperantista Ligo. La klopodo de SEL konsistas en « adopta plano » laŭ kiu individuoj, lokaj grupoj, landaj asocioj estas instigataj « adopti » lokajn skoltajn grupojn kaj donaci al ili la ĵus aperintan specialan lernolibreton « Jamborea lingvo ». Mendu la lernolibretojn al viaj esperanto-libroservoj (prezo : 2,50 guld. = sendkostoj). Adreso de SEL : S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

## Eldonaĵoj.

— La unua numero de la trimestra gazeto « Turista Mondo » (8 paĝoj grandformataj) aperis. En ĝi oni povas interalie legi artikolojn pri Prago, Lucerno, Monako, Kanado. Ĉefredaktoro : D-ro H. Unger. Adreso : Turista Mondo, Zurich 22, Svislando. Abono (4 numeroj) : 10 sv. fr.

— Estis represitaj : « La verda koro » de Julio Baghy, kaj 96-paĝan ŝlosilon por 12 lingvoj, el kiuj esperanto.

— Ĵus aperis « Bildoj kaj faktoj pri Germania Demokratia Respubliko », 256paĝa ilustrita libro eldonita de Verlag Zeit im Bild, Dresden.

— Alvokas por nova traduko de la Biblio en esperanton kaj bezonas helpantojn Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj Piazza Duomo 4, 48 100 Ravenna, Italio.

— La eldonejo Stafeto jus eldonis :
« El la polvo de la tero — Enkonduko en la grundo-sciencon » de W.C. Rolt.
« Arĉoj », sonetaro de Geraldo Mattos kun antaŭparolo de G. Waringhien.
« La infana raso », poemo en 25 ĉapitroj de W. Auld. Dua eldono, prinotita. Prologoj de V. Benczik kaj J. Francis.

## Turismo.

La Hispanaj Naciaj Aerlinioj « Iberia » eldonis esperantlingvan ilustritan faldfolion por prezenti sion iom- post-ioman pagsistemon « Crediovuelo ». Speciala letero estis sendita al 1 200 esperantistoj por instigi ilin al uzado de tiu sistemo okaze de gravaj internaciaj eventoj inter kiuj estas cititaj la studperiodoj de Gresillon. Adreso : Lineas Aeras Iberia, Plaza de Espana, Barcelona, Hispanujo.

## Por trafa propagando.

En la tutmondaj oficialaj organismoj (interalie en la organismoj de UN) pli kaj pli reflektiĝas la akriĝantoj luktoj inter la lingvoj de grandaj potencoj. Tiu fakto kaj la gigantaj elspezoj, kiuj rezultiĝas, sendube ne estas sufiĉe ekspluatitaj de niaj propagandistoj kaj ne konataj de la « gronda publiko ».

Speciale atentindaj estas artikoloj aperintaj en diverstendencaj esperantaj revuoj, ĉefe en « Esperanto » de julio-augusto : « UN : kiom da lingvoj » kaj la unuan rezolucion de la kongreso de Helsinki.

## LA PROVENCA LITERATURO

# Roumanille, Mistral, Aubanel

## *tri fondintoj de l' « felibrige »*

Same kiel dum la XVa kaj la XVIa jarcentoj la movado konata sub la nomo de « Renesanco » okazigis en okcidenta Eŭropo plenan renovigon en la literaturo, la artoj kaj la sciencoj, karakterizatan precipe per imitado de la klasika antikveco, dum la XIXa jarcento, en suda Francujo, vera « renesanco » okazis pri la lingvo kaj la literaturo provencaj.

Tiu movado efektiviĝis kaj eterniĝadis pere de la Literatura Asocio, kiu nomiĝas « Felibrige ». Ĝi estis fondita la 21an/de majo 1854 en la kastelo de « Font Segugno » apud Avignon fare de sep junaj poetoj en lingvo d' « oc » ; ili estis : Jozefo Roumanille, Frederiko Mistral, Anselmo Mathieu, Julo Giera, Teodoro Aubanel, Johano Brunet kaj Alfonso Tavan.

De tiu movado Roumanille estis la antaŭulo, Mistral estis la ĉefo kaj la gvidanto, Aubanel estis unu el la plej karakterizaj.

Jozefo Roumanille naskiĝis en Saint-Remy la 8an/de aŭgusto 1818 ; li estis la plej maljuna el la sep.

Li ricevis en la gimnazio de Taraskono fortan klasikan edukadon kaj poste estis instruisto en Avinjono en modesta edukejo direktita de Jacinto Dupuis, poeto en provenca lingvo kaj, kie jam instruis alia provenca poeto Kamilo Raybaud.

En 1845, unu el la lernantoj de tiu edukejo, 15 jaraĝa kaj naskiĝinta en Maillane, nomiĝis Frederiko Mistral ; li jam estis skribanta poeziaĵojn en provenca lingvo.

De tiu providenca renkontiĝo datumas tiu nedifektigebla amikeco, kiu kunligis la instruiston kaj la lernanton, malgraŭ diferenco de dekdu jaroj en la aĝoj.

Kaj de tio, vere naskiĝis la « Felibrige », tute elveninta de tiuj fekundaj rilatoj inter Roumanille kaj Mistral.

Roumanille verkis kelkajn arojn da poeziaĵoj, t.e. : « Li Margarideto » (la lekantetoj) en 1847, « Li flour de Sauvi » (la floroj de Salvio) en 1859, kelkajn « Kantojn por Kristnasko », kaj diversajn prozaĵojn.

Sed, ek de 1850, la ĉefa afero de Roumanille estis grupigo de ĉiuj fortoj kiuj povus esti utilaj por la purigado kaj la renovigo de la provenca lingvo. Li, al tiu celo, sindonis dum la tridek lastaj jaroj de sia vivo.

Li kreis l' « Armana Prouvençau » (Provenclingva Almanako), kaj verkis por tiu jara libro, amuzajn kaj moralajn rakontojn kiuj faris lin inda heredanto de niaj plej famaj rakontistoj de la Mezepoko kaj de la Renesanco.

Sed al Frederiko Mistral apartenas la plej granda parto en la prilaborado de la provenca renesanco.



Mi pensas, ke por bone konigi al vi lian personecon kaj lian verkaron mi devas utiligi la laborojn de Prof. Alfred Dumas pri li :

— « Frederiko Mistral naskiĝis la 8an de septembro 1830, en la farmdomo nomita « Lou mas doŭ Juge » (la farmdomo de la juĝisto), apud « Maillane ». Li ĉarme rakontis mem sian devenon, la biblian reedziĝon de sia patro, sian infanecon de kampara bubo. Li diris per abundaj kaj spritaj detaloj kiel li lernis aŭ pli bone amuziĝis,

en proksima lernejo, speco de Telema abatejo por infanoj, kiel li renkontis Roumanille en Avignon, kiel li studis la juron en Aix-en-Provence.

Tiam, en 1851, plenuminte la deziron de la patro, li povis sekvi sian propran volon kaj resti hejme.

Kamparano sen laciga laboro, kun plena instruo, li dediĉis longan tempon al la revo, al la poezio. Cetere li jam destinis sian vivon al preciza idealo : revivigi la gloron de Provenclando kaj nobligi ĝian lingvon. Eĉ antaŭe, dum siaj studoj, tion li celis ; kun Roumanille en Avignon, kun Anselmo Mathieu en Aix, li ensorbis la puran harmonion de l'provencaj vortoj kaj skizis la planon de sia estonta agado. La efektiviĝo ne prokrastiĝis. La 29an de aŭgusto 1852 okazis en Arles kunveno de aŭtoroj en « lengo d'O » kaj du jarojn poste, la 21-an de majo 1854, en Fonsegugne sep junuloj fondis la Societon de l' « Félibrige ». Estis Mistral, kiu trovis tiun misteran kaj belsonan nomon, tute oportunan por poezia, tradicia rolo.

Iom post iom la fajro ekbruligita en kasteleto kontraŭ la altaj pintoj de l'monto Ventoux, etendiĝis tra la tuta regiono, transpasis Pireneojn, atingis Oceanon, varbis aliĝantojn en malproksimaj landoj kiel Anglujo kaj Rumanujo.

Mi jam diris, ke Mistral estis la ĉefo kaj la animo de la Societo ; li multe agadis sed, pli bone ol agi, li skribis verkojn originalajn kaj perfektajn, citindajn kiel plej purajn kreaĵojn de la homa spirito. En sia domo duonkampara inter korto kaj ĝardeno li skribadis sen febro, sed preskaŭ sen halto kun saĝa reguleco kaj poezia perfekteco, proksimume ĉiun sepan jaron la jenajn librojn :

1) — MIREIO (Mirejo 1859 : poemon de la naiva amo en kadro de mirinda provenca naturo. Maniero tute nova, partoprenanta de l'idilio kaj de l'epopeo. La amadoj de Vincento kaj Mirejo havas tiom da ĉarmo, kiom tiuj de Romeo kaj Ĝiulieto, aŭ de Paŭla kaj Virginio, sed ili havas pli da amplekso.

Aŭskultu la jenajn vortojn de Lamartine, prezentanta al la klera mondo tiun kamparan epopeon :

> « La vilaĝa literaturo estas trovita. Dankon kaj gloron al la Providenco ! Granda epopea poeto naskiĝis. Ilin ne faras plu la Okcidenta naturo ; sed la Suda naturo ĉiam ilin faris. Virto estas en la suno ! Vera poeto en tiu tempo ! Poeto naskiĝinta, kiel la homoj de Deŭkalion', el ŝtonego kraŭa ; poeto primitiva en nia aĝo malaltiĝa, poeto greka en Avinjono, poeto kreanta lingvon el idiomo, kiel Petrarko kreis la Italan ; poeto, kiu el vulgara dialekto faras klasikan lingvaĵon, plenan da figuroj kaj harmonio, ravantan la imagon kaj aŭdon, poeto ludanta per la muzikileto de sia vilaĝo simfonion de Mozart kaj Beethoven, poeto dudekkvin jara, kiu de l'unua ŝpruco, fluigas el sia vejno per puraj kaj melodiaj ondegoj, kamparecan epopeon, en kiu la priskribaj scenoj de l'Homera Odiseo kaj la scenoj senkulpe pasiaj de Dafnis kaj Kloe, de Longus, miksitaj al la sanktaĵoj kap malĝojoj de l'Kristanismo, estas kantataj kun la ĉarmo de Longus, kaj kun la majesta simpleco de la blindulo de Chio. »

2) — CALENDAU (Kalendaŭ) 1867 : altan kaj potencan epopeon, kiu kantas l'animon de Provenclando en ĝiaj plej fortikaj trajtoj kaj priskribas la kvazaŭ religian karakteron de la Sud Francaj montaroj.

3) — LIS ISCLO D'OR (La Oraj Insuloj) 1875 : kolekton de versaĵoj en kiu miksiĝas ĉiuj lirikaj tonoj, kie la aŭtoro haltis por revi pli libere inter siaj longaj verkoj, kiel oni revas en la Oraj Insuloj apud Hyères, kontraŭ la Granda Bluaĵo.

4) — Intertempe, de 1878 ĝis 1886, Mistral pretigis grandan vortaron de ĉiuj vortoj, ĉiuj esprimoj de « Lengo d'O » : « Lou Tresor Dou Felibrige » (La Trezoro de l'Felebrige) ; vera trezorejo ne elĉerpebla, el kiu eliĝis kaj eliĝos ĉiuj riĉaĵoj de la Provenca literaturo.

5) — NERTO (1884) : fabelon de la mezepoko ; simbolon de la malgranda patrujo. Nerto, destinita al la pereo, estas fine savita, kun la helpo de Dio, dank'al sia beleco, per l'amo de pasia kavaliro.

6) — LA REINO JANO (La Reĝino Johanino) 1890 : lirikan dramon kiu rehonorigas la memoron de Reĝino kulpigita pro sia partopreno en la mortigo de sia edzo.

7) — LOU POUEMO DOU ROSE (La Poemo de Rodano) 1897 : kiu kantas la malnovan vivon de la riverego, kiam ŝipoj ĝin laŭlonge traveturigis popolon fieran, laboreman, gajan, spritan, religieman, haltante apud belaj urboj : Orange, Avignon, Beaucaire.

8) — LA GENESI (La Genezo) 1906 : provencan tradukon de la unua libro de la Biblio.

9) — DISCOURS E DICHO (Paroladoj) 1906 : elokventaj paroladoj en honoro de Provenclando.

10) — MOUN ESPELIDO — MEMORI E RACONTE (Mia deveno — Memoroj kaj Rakontoj) 1906 : mirindaj rakontoj pri la unuaj jaroj de l'aŭtoro kaj ŝercoplenaj fabeloj.

11) LIS OULIVADO (la Rikolto de la olivoj) 1912 : kolekto simila al « Lis Isclo d'Or », tiel bela sed iom pli serena pro la proksimeco de la morto.

(daŭrigota).

H. BOURDELON.

## Tra Francujo

# VOJAĜO en QUERCY

Quercy, regiono, kiu etendiĝas inter la riveroj Lot kaj Dordogne prezentas al la turistoj multajn plej vizitindajn lokojn.

La urbeto Roc-Amadour staras sur roko superrigardanta verdantan valon. De la 12-a ĝis la 14-a jarcentoj, Roc-Amadour estis loko de pilgrimadoj. Sed detruitaj de la religiaj militoj la urbeto kaj la sanktejo renaskiĝis nur en la 19-a jarcento. Vidindaj estas la malnovaj stratoj, urbopordegoj, la kastelo kaj la religia civito. Apud Roc-Amadour komenciĝas la Causse de Gramat, kaj norde, la Causse de Martel, ke oni malkovras la tipajn pejzaĝojn de kalka regiono kaj pitoreskajn urbetojn kaj vilaĝojn.




Pli sude la turisto nepre vizitu la valon de la rivero Lot. De la kastelo Bonaguil, 15-16a jarcenta fortreso, li iru, orienten al Cahors, urbo fama pro sia Ponto Valentré, belega ekzemplero de la milita mezepoka arto ; li pluiru al la vilaĝo Saint-Cirq-Lapopie, mirinde lokita sur roka krutaĵo, kun mallarĝaj stratoj, malnovaj domoj restaŭritaj de artistoj logitaj de la tre pitoreska regiono ; li poste vizitu la grotojn Pech-Merle, malkovritajn en 1922, kiuj prezentas pra-historiajn gravuraĵojn kaj skulptaĵojn.

Ĉio estas vizitinda en Quercy kaj la iom laca turisto povos ripozi en unu el la agrablaj gastejoj kaj refreŝiĝi per gastronomiaj specialaĵoj, kiel ansera konfitaĵo, ansera hepataĵo, boletoj kaj kompreneble la malnova vino de Cahors.



En la ĉirkaŭaĵo estas nepre vizitindaj : la Faŭkoj de Padirac, kiu kondukas al naturaj galerioj, mistera rivero kaj vastaj kavernoj ornamitaj de kalkaj kunkreskaĵoj ; la urbeto Saint-Céré kun malnovaj domoj kaj la kastelo Saint-Laurent, kie Jean Lurçat desegnis siajn mirindajn tapetojn ; la grotoj de Lacave kaj Presque.



# François RABELAIS
## kaj Renesanco (II)

Malfacile estas imagi ĝustan bildon pri Rabelais. Nek la opinioj de liaj samtempuloj, nek la opinioj de la posteuloj samas. Tamen nun, fariĝis unuanimeco pri unu punkto : li estis superstara geniulo, majstro de la vorto, grandanima, progresema, senkompara erudito, iel profeto de la estonto.

Liaj unuaj verkoj, pure sciencaj, havigis al li reputacion de klerulo, humanisto kun eksterordinaraj konoj. La apero de Pantagruel furiozigis kontraŭ li kritikojn, insulton, malamon. La pli indulgaj bedaŭris, ke li tiom misuzis sian elstaran naturan talenton. Samtempe, pli ĝustevidaj homoj lin ŝatis kaj alte aprezis. Efektive, en lia romano, sub groteskaj maldelikataĵoj, eĉ trivialaĵoj, sin kaŝas altaj instruaĵoj kaj senkompataj atakoj,, vipantaj satiraĵoj kontraŭ la ekscesoj, la malprogresemo, la tiraneco de la oficialaj institucioj.

Por liaj malestimantoj, Rabelais estis cinikulo, kiu plezurege atakis, malrespektis ĉion repektindan. Kelkaj linioj el samtempaj verkistoj plej bone elmontros la akregecon de liaj malamikoj :

Gabriel de Puits-Herbault skribas :

« Li estas viro tiom danĝera pro sia malpieco, kiom pro la publika skandalo de siaj libroj..... (li estas) senhonta mokaĉulo kaj sen ioma honesteco, kiel oni povas toleri tion ? »

Joachim du Bellay diris en epitafo al li dediĉita :

« Dormado kaj manĝemo, virinoj kaj mokaĉo estis miaj solaj diaĵoj dum mia tuta vivo. Mi posedis arton kaj praktikon de medicino, sed mia ĉefa okupo estis praktiki ridon ».

Ronsard ankaŭ verkis epitafon, ne pli indulgan :

« Vito naskiĝos el la stomako kaj ventro de l' bona Rabelais, kiu drinkis ĉiam, kiam li vivis ».

Calvin nomis lin « porkaĉo ».

Samtempe kleraj homoj agnoskas lin kiel altvaloran. Lia enciklopedia scio, lia potenca menso estis laŭdataj, lia kuracista reputacio estis grandega. Oni ofte nomis lin « la scioplena Rabelais ». Ni trovas trafajn eĥojn de tiu admiro en la jenaj linioj de Gilbert Vulton, en teksto titolita : « Al Filozofio » :

« .... Ci kunprenas kaj ravas en la eterajn spacojn, diino, ciajn fidelulojn. Inter ili, en la unua vico, aperas Rabelais, superega majstro en la studoj, kiuj cin rivelas, O sankta saĝo ! »

En epitafo, latine verkita de Pierre Boulanger, ni povas legi :

« Sub tiu ŝtono kuŝas la plej bonega el la ridemuloj..... Ne, ne, li estis nek amuzisto, nek publika sorĉisto. Sed per delikata kaj penetranta genio. li primokis homaron kaj ĝiajn malsaĝajn dezirojn, kaj la kredemon de ĝiaj esperoj..... »

Kiel interpreti tiujn du malajn juĝojn pri Rabelais ? Kio instigis la malamon de la unua ? Kio pravigis la laŭdon de la dua ?

Sendube la akraj atakoj kontraŭ hipokriteco kaj rutino naskis malamon de unuj. La aliaj — laŭ la rekomendo mem de la verkisto — « per scivola studado rompis la oston kaj sucis la nutrigan medolon ».

Efektive, studante lian verkon, sub la komika kaj groteska vesto, oni malkovras abundon de saĝaj konsiloj, de altaj moralaj kaj spiritaj lecionoj. La elmontrita erudicio naskas miron kaj admiron. Neniu el la tiamaj sciencoj estis nekonata al li. Li estis eminenta verkisto, sciencisto, medicinisto, juristo, poligloto. Li sciis, krom la latina kaj greka lingvoj, probable la hebrean ; scipovis la anglan, la germanan, la italan, eĉ studis la araban. En artikolo aperinta en « Kulturaj Kajeroj » (n° 3 de 1968) ni montris lian elstaran lingvokapablon. En numeroj 1 kaj 2 de la sama jaro, S-ro P. Guillot pristudis lian verkon kun granda kompetenteco, kaj ni ne bezonas pli longe priparoli ĝin.

Fakte ni malmulte scias pri la vivo de tiu geniulo. Ĝi estas grandparte nekonata ; kredeble, tia ĝi ĉiam estos. Ni havas neniajn informoj pri kelkaj longaj periodoj. La longaj kaj fundaj esploroj de la lastaj jardekoj, ŝajne liveris ĉion scieblan. Tiu vivo estas sinsekvo de altiĝoj kaj malaltiĝoj, sukcesoj kaj malsukcesoj, plena de baraktado kaj agitado.

Sed la pli stranga trajto de tiu vivo ŝajnas nesolvebla mistero. Kial kaj kiel okazis, ke tiu eksmonaĥo, de et-burĝa deveno — do suspektinda laŭ la tiamaj moroj — sukcesis akiri tian universalan scion kaj, ke li ricevis subtenon kaj amikecon de plej altranguloj en la societo ? Du francaj reĝoj, tri kardinaloj, la gereĝoj de Navaro, nobeloj, inter aliaj, malkaŝe protektis lin kontraŭ ekleziaj kaj universitataj malamikoj. Tiu mistero jam de longe konfuzis la historiistojn.

Ekde la lasta jarcento, konsciencaj serĉantoj penadis solvi la problemon. Kelkaj atentigis la publikon pri la nekonata, kvankam gravega rolo de la sekretaj societoj en nia historio. Tiuj societoj konsistis el personoj, kiuj pretendis gardi kaj daŭrigi tre antikvan tradicion, antaŭan eĉ al Kristanismo. Ili estis pli malpli konataj laŭ la nomoj de alĥemiistoj, hermetistoj, astrologoj. Ili estis la kerno kaj la veraj estroj de la korporacioj. Oni rimarkigas, ke Rabelais, kiam li envenis en Lionon, konatiĝis kun unu el tiuj misteraj societoj, la « Agla », potenca asocio de presistoj kaj libristoj. Ankaŭ tiam, li amikiĝis kun la famega Nostradamus, astrologo de la reĝino de Francujo. Plie, funda studo de liaj verkoj montras, en multaj lokoj, aludojn pri la esotera scienco, aŭ dusencajn esprimojn. Li mem diras ke, li estas « abstraktanto de kvintesenco », kio signifas, ke li studas alĥemion.

Ĉu tie kuŝas la ŝlosilo de la enigmo ? Ni ne povas aserti tion. Ĉiel la hipotezo ŝajnas studinda. Lastaj malkovroj pruvis, ke multaj eminentuloj apartenis al tiaj sekretaj societoj. Ne malveršajne aperas la ebleco, ke Rabelais estis unu el tiuj mistikuloj devigitaj sin kaŝi pro la ĝeneralaj malklereco kaj maltoleremo.

E. MOTILLON.




RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1969

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

al

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière

44 - **Nantes** -- Francujo

p.k. Nantes 2 813-61

(nur per ĉeko)

**aŭ al via peranto**

# POEZIAĴOJ

de Aleksandro LOGVIN

**Glora Dato**

Homoj — sur la Luno ! Luno ! Luno !
Ni salutu Nejl kaj Edvin, ĉar
Ĝoj' ilia — ĝojo de la Nuno,
De la tuta mondo, de l'Homar' !


Homoj — sur la Luno ! Gloro ! Gloro !
Ni aplaŭdu al fantasta far' !
Estas plej solena, splenda horo :
Vidi l'astronaŭtojn ĉe l'ŝtupar'...

Vidi tuj, kiel unue homoj
Piedprovis grundon de la Lun',
Flue saltis, kvazaŭ du fantomoj,
Kaj kolektis ŝtonojn en lagun'.

Tri amerikanoj sur la Luno
Kronis belan revon kun jubil' !
Venkis penso, heroeco, juno
Kaj labor' de l'Homo dum jarmil'.

Malfermita nun reala vojo
Por la plua univers-konker'...
Tamen estu ĉi konker' nur ĝojo,
Nur feliĉo por la homa Ter' !

Moskvo 21-7-1969.



de Gyula B. BERCZESSI

**Aŭrora Silento**


Mi sidas solece sur benko de l'placo,
kaj ĉirkaŭkisadas la granda silent' :
nun estas ĉi tie trankvilo kaj paco,
kaj al mi brilegas la ĉarmorient'.

Eĉ dormas la monto kaj dormas la valo,
magi' de l'aŭroro ĝisrande en mi :
sur floro jen dancas silento-petalo,
kaj estas giganta ja nun la neni'.

**Pri la polvero**

Oni iras tra la vojo,
ĉu vespere, ĉu matene,
kun malĝojo, aŭ kun ĝojo,
oni tretas ĝin senĝene.

Mi polvero de l'vivstrato,
kiu iras brako en brak',
ke oni min tretas — frato,
ne estas ĝi abrupta hak'.



# NOSTRADAMUS

Dum 4 jarcentoj literaturaĵoj abundis pri Nostradamus. Ili fontis precipe el memuaro titolita « Mallonga parolado pri la vivo de Michel de Nostre-Dame, konsilisto kaj medicinisto apud la francaj reĝoj Henri II, François II, kaj Charles IX ; memuaro publikigita en 1594 sub la subskribo de Jean Aimé de Chavigny, doktoro pri juro kaj teologio, eksa juĝoficiro en Beaune kaj disĉiplo de Nostradamus.

Tiu memuaro estas revidita kaj ampleksigita de Cesar (filo de Nostradamus) en lia « Kroniko de Provenco », kaj de Jean de Nostre-Dame (postnaskita frato de Michel), prokuroro ĉe la Parlamento en Aix-en-Provence.

El juda deveno, la praa familio de Michel fariĝis kristana, kaj skrupule igis lin respekta al tiu religio.

Post morto de lia avo — de Saint-Remy — kiu edukis lin, Michel estas sendita en la papa urbo Avignon por tie fari « humanismajn studojn », en fama gimnazio. Tie ĉi oni tuj rimarkis « lian preskaŭ dian memor-kapablon ». Alterne, li perfektiĝis pri latino, gramatiko, filozofio, retoriko, aritmetiko, geometrio kaj precipe pri astrologio, kiun de Sant-Remy jam instruis al li. La profesoro nomis lin « la juna astrologo ».

En 1521 li estas premiita « majstro-pri-artoj. » De tiam li vivas en Montpellier, kie la studoj estas longaj kaj multekostaj, celante studi medicinon kaj akiri bakalaŭrecon, licencion kaj doktorecon.

En 1526 li ĵus fariĝis abituriento, kiam la pesto (sendube alportita de la soldatoj de François I-a) disvastiĝas en Languedoc. Kiel kutime la primedicinaj studentoj forlasas la Fakultaton por helpi la malsanulojn. Dum multaj monatoj, en Narbonne, Toulouse kaj Bordeaux, Michel preskribas profilaktikajn rimedojn kaj disdonas kuraĝigojn, kaj kuracilojn de sia propra komponado. Samtempe li observas siajn kolegojn kaj iliajn metodojn. De regionaj metiistoj li lernas receptojn por prepari medikamentojn, parfumojn, beligaĵojn kaj eĉ kulinaraĵojn. Li ankaŭ interesiĝas pri botaniko kaj herbokolektado. Proksimume en 1529 (li estas 30-jara) li revenas en Montpellier.

En 1533, laŭ la tiama kutimo, li latinigas sian nomon : Nostradamus.

Sian tezon li prezentas antaŭ ekzamenantaro, kies Prezidanto estas Antoine Romier, tiama famega medicinisto. Michel fariĝas Doktoro kun « laŭdo kaj admiro » de la tuta kolegio. Dum kelkaj monatoj, pro deziro de siaj kolegoj, li instruas en Montpellier, sed allogita de vaga vivo, li instaliĝas dum kelkaj monatoj en Toulouse kaj poste en Agen, kien vokas lin Jules Bordoni, kiu nomigas sin Jules-César Scaliger (kiel posteulo de Benedetto della Scala, Princo de Verone). Medicinisto apud la Episkopo, Scaliger estas tre erudita, brila humanisto, fama verkisto, sed kun tre malagrabla karaktero. Li ĉirkaŭigas sin de distingitaj inteligentuloj.

Tie ĉi Nostradamus hejmenigas post edziĝo kun junulino el « alta loko » bela, agrabla, kiu donas al li 2 infanojn.

Bedaŭrinde, pro simpatio al Reformacio, lia amiko, direktoro en kolegio, estas enketita de la Toulousa Inkvizitoro. Nostradamus ektimas kaj preferas forkuri al Bordeaux kaj La Rochelle. Kiam ne plu estas danĝero li revenas, en 1539. Sed dum lia foresto mortis liaj edzino kaj infanoj.

Scaliger, kiu estis ankaŭ suspektita de la Inkvizitoro, kolera kontraŭ Nostradamus, fermas al li sian pordon kaj eĉ lin insultas (li nomas lin juda fiulo kaj ŝarabia-manĝanto).

De tiam Michel sekvos saman konduton : ne preterlasi okazon anatemigi kontraŭ la kalvinana partio.

Definitive, Nostradamus forlasas Agen kaj direktiĝas al Centra kaj Orienta Francujo. En Loreno, pro ludo, li pronuncas sian unuan antaŭdiraĵon : dum vizito al lorena kastelano, Nostradamus vidas antaŭ si du porkojn : unu blanka, la alian nigra ; Michel anoncas, ke li manĝos la unuan kaj ke lupo prenos la duan. Por montri ke li mensogis, la kastelano ordonas, ke oni kuiru la nigran. Sed... okazas, ke lupo alproksimiĝas kaj formanĝas tiun nigran porkon. La kuiristo estis devigata prepari la blankan.

En 1943 li estas matura homo sopiranta al vivo trankvila, facila kaj senzorga. Amikoj vokas lin al Provenco. Li instaliĝas en Salon-de-Crau. En majo 1546 terura pesto-epidemio eksplodas en Aix : oni nomis ĝin « provenca karbunklo » pro la nigraj makuloj, kiuj kovris la korpon de la malsanuloj. Oni rakontas, ke, por sin kaŝi, la mortontoj mem « kudris per siaj manoj siajn blankajn mortotukojn ». Multaj kuracistoj, hororitaj, forkuris.

La urbaj konsuloj petis helpon de Nostradamus. Li alvenas en urbon afliktitan kun butikoj fermitaj, preĝejoj dezertitaj, stratoj « vilaj, sovaĝaj, kaj plenaj je herboj », sur kiuj vagas homoj idiotigitaj kaj terurıtaj. Tuj li vizitas la infektitajn domojn, la hospitalojn. Li ordonas, ke oni purigu la stratojn kaj kloakojn, ke oni malliberigu la malĉastulinojn, ke oni lavu la murojn per aromigita vinagro kaj li rekomendas medikamentojn inter kiuj miksaĵon de segaĵoj de cipresoligno, iriso de Provence, kariofilo, mosko, ambro, karnkoloraj rozoj, violo-pulvoro, speciale bonega por ĉasi koruptitajn odorojn ».

Dum pli ol 9 monatoj la epidemio ruinigas la urbon. Nur en 1547 la mortintoj fariĝas pli malmultaj kaj Nostradamus reiras al Salon. Antaŭ lia, foriro li ricevas multajn dankajojn : municipo faras al li pension, artistoj faras **lian** portreton kaj multaj nekonatuloj alportas donacojn.

Nelonge li restas en Salon. Denove pesto disvastiĝas en Lyon kaj la urbaj eminentuloj vokas lin. Tie li renkontas malfacilaĵojn fare de liaj kolegoj, kiuj ne volas akcepti liajn metodojn. Post kelkaj semajnoj la epidemio cedas kaj la urbestroj laŭdas liajn sciencon kaj sindonemon.

En 1547 li edziĝas en Salon kun juna riĉa vidvino. La paro estas sufiĉe riĉa : doto de 800 florenoj por la edzino kaj 300 or-eskudoj por la viro. Ili havos tri knabojn kaj tri knabinojn.

Sed Nostradamus ŝatas vojaĝi : en 1548, 1549 li estas en Marseille, Gênes, Savone, Carcassonne (tie li flegas, kontraŭ pesto, episkopon per speciala pomado : lazurŝtono, koralo kaj or-folio ; Monsin. Ammanien de Fays « sentas la vivon reveni en sian korpon »).

Nostradamus estas preskaŭ 50-jara. Liaj protretoj montras lin mezstatura kun solida korpulenteco : li ŝajnas kvieta, kvankam liaj samtempuloj rakontas liajn violentajn kolerojn. Lia vizaĝo estas ovala « preskaŭ vermiljona » kun larĝa frunto, abunda malhela kaŝtanhararo, kun longa barbo, frue blanka, okuloj grizaj, rigardo rekta kaj akra, lipoj « manĝemaj ».

Li multe laboras — post flegado de siaj malsanuloj — en sia libro-ĉambro meze de siaj multaj libroj kaj plej strangaj objektoj alportitaj el siaj vojaĝoj. Ĉar 4-5 horoj sufiĉas al lia dormo, li longe restas en observatorio, kiun li konstruigis sur sia tegmento kaj kiun li atingas per spirala ŝtuparo el sia ĉambro : li studas la ĉielon ĉar li kredas, ke estas kuniĝo inter medicino kaj astrologio.

Kompreneble la Salon-anoj multe klaĉas pri li. Fronte al laŭdantoj estas multaj malestimantoj, kiuj diras lin religio-malamiko (tiam, grava riproĉo), magiisto demonposedata. Oni eĉ brulas lian figuraĵon. Li ŝajni-

gas indiferentecon sed elmontre vizitas diservojn kaj atentas fastojn, almozdonadon kaj humilecon.

Li daŭrigas siajn studojn kaj en 1550 li eldonas libreton en kiu li aŭguras, por la venontaj monatoj, eventojn feliĉajn kaj malfeliĉajn pri politiko kaj meteorologio kaj konsekvence li donas praktikajn konsilojn.

Antaŭe oni jam vidis multajn Efemeridojn, Kalendarojn, Almanakojn, Prognozarojn ; sed tiu de Nostradamus estas la unua verkita de medicinisto. Kompreneble liaj kolegoj lin malaprobas. Tamen la libreto estas multvendata kaj de tiam Nostradamus, ĉiujare, eldonas aŭgurlibreton. Li eĉ deklaras, ke, por li, Estonteco estas sen sekreto.

Spite al ĉiuj atakoj, Nostradamus estas fame konata kaj jen du novaj libroj :

en 1555 : « Traktaĵo pri ŝminkoj kaj konfitaĵoj », skribita sekve al peto de « granda Princino » ; ĝi parolas ne nur pri beligaĵoj sed ĝi donas terapiajn receptojn por ĉiuj :

« Ĉia virino, eĉ tiu, kiu ofte faras infanojn, ĉiujare kadukiĝas je 5 % » Estas necese, ke kuracisto ŝin helpu. Nostradamus mem, post longaj kaj pedantaj esploroj povas al ŝi proponi « sublimaĵon » tiamaniere faritan : « distili en vitra distililo citronojn miksitajn kun hidrargo, akvo kaj salo ; vaporigi sub suno ; denove aldoni fonto-akvon kaj venecian ceruzon miksitan kun ovo-blanko ; kirli per blanka plumo ; forpreni la ŝaŭmon kaj longe boligi ».

« Kondiĉe ke la virino ĉiumatene ŝminku sin per tiu eliksiro, ŝi estos senigita je sia malbona sango kaj ricevos blankan vizaĝ-koloron ĝis la 60-a ».

Kaj jen kuraciloj « por dolĉigi la spiraĵon, purigi la dentojn eĉ tiujn, kiuj estas ege putritaj kaj plenaj je malnova rustaĵo », jen « por malaperigi kupezoromakulojn » ; jen « efikega lavakvo por tinkturi la harojn kaj ilin igi blondaj kiel or-reto » ; « kaj alia por nigrigi la barbon ; jen ankoraŭ alia por fleksebligi la histojn kaj lukti kontraŭ korpajn odorojn ».

Pli speciale Nostradamus interesiĝas pri parfumoleoj. Laŭ li « ili estas kapablaj kontraŭstari plej diversajn dolorojn : abdomenajn dolorojn, mensaj perturbojn, reŭmatismojn, malfacilajn akuŝojn. Sed precipe ili varmigas la matricon de malfrodiziaj virinoj ». « Sufiĉas, diras li, meti en buŝon etan kvanton da produkto speciale farita kaj kun speciala odoro kaj poste ĝin glitigi kun iom da salivo inter la lipojn de la amata persono por ke tiu ĉi tuj sentas sin incendiata de tia ardo, ke ŝi preferus morti prefere ol ne kontentigi sian pasion ».

La dua parto de la verkaĵo temas pri konfitaĵoj : sed ĝi entenas pli da medicinaj konsideroj ol da gastronomiaj.

Ekzemple : « Ni ekscias, ke cidoni-gelatenaĵo havas konstantan efikon kontraŭ « vento-fluoj » ; ke zingibro-konfitaĵo taŭgas por sterilaj virinoj kaj por viroj nekapablaj efektivigi sian esencan devon ; ke la dolĉaĉeriza konfitaĵo, kondiĉe ke ĝi estu klara kaj vermiljona, kiel delikata rubeno estas bonega stimulilo por infanoj malfacile kreskantaj ; ke la prunoj akcelas la intestajn funkciojn, ke la persikoj havas tute specialan efikon kontraŭ anemio ».

Tiu libro, kiel multaj aliaj laŭlonge de la jarcentoj, alportas receptojn por kuraci plej ordinarajn malsanojn, receptojn ŝajne neeraremajn kiuj ĉiam allogas kredeman publikon.

Aliajn librojn eldonas Nostradamus inter kiuj « Parafrazo de Gallien pri artaj kaj medicinaj studoj » kaj « Utilaj kuraciloj kontraŭ pesto kaj pesto-similaj febroj ».

Sed ne estas tiuj libroj kiuj famigis lin antaŭ la posteularo. Estas en 1555, ke Nostradamus aperigas siajn unuajn « Profetaĵojn », kiuj koncernas la tutan homaron, sed tra kiuj ĉiu serĉas sian propran estontecon. La libro estas dediĉata al sia filo Cesar. En lerta antaŭparolo Nostradamus montras sin, kiel homon dotitan de eksterordinaraj talentoj (sekretoj, kiuj li ne povas liveri al iu ajn, kaj kiuj malaperos je lia morto).

Al sia amiko Chavigny, li parolas pri libroj el antikvaj Egiptujo kaj Persio, libroj, kiuj mirakle venis en liajn manojn kaj kiujn li estis devigata detrui post ellegado.

Li bazas sian Povon sur 2 faktoj : unue lia granda scio pri astrologio kaj ĉiela mekanismo ; due (ĉar li ne volas esti juĝata kiel sorĉisto) sur dia interveno (li diras, ke lia familio devenas de la tribo de Issachar, filo de Jakob) kaj li skribas « Dio ĉi tie uzas mian buŝon por anonci al vi la veron ; se mia profetaĵo tuŝas vin, danku la diaĵon ».

Tuj de ilia apero la « Profetaĵoj », kvankam ili anoncas egan kvanton da militoj, revolucioj kaj aliaj plagoj, renkontas grandan sukceson. En Parizo, Catherine de Medicis, fidema je ĉiu divenisto, deziras renkonti la magiiston. Pere de Claude Sassie, grafo de Tende, kaj guberniestro de Provence, la reĝo Henri II lin invitas. Nostradamus forlasas Salon la 14-an de julio kaj atingas Parizon la 15-an de aŭgusto.

Unue li loĝas en albergo ; per letero al la reĝo, li anoncas sian alvenon. Kelkajn tagojn pli poste estas Anne de Montmorency, konestablo, kiu lin kondukas al la Reĝaj Moŝtoj. Reĝo kaj Reĝino estas ĉarmataj de lia klereco kaj lin loĝas en la luksa domo de Sens-Episkopo.

